

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA – 1984 – HONORA MENCIO

Virino kiu flustris en uragano

Teatraĵeto

PERSONOJ: VIRINO en la roloj de ESPERANTO-VERKISTINO
 JAPANA ĴURNALISTINO
 HUNGARA AKTORINO

*(Virino legas en ĉambro. Fotelo. Skribotablo kun tajpilo. Valizo. Milda lumcirklo de tablo-
lampo. Trankvilo. Radiomuziko: Bach – Fantazio C-Minora. Foje ekaŭdiĝas ventego el
ekstero. Ŝi ĉesigas foliumadon, ekinteresiĝinta voĉlegas:)*

VIRINO: “Jiamusi, kiu ekhavis sian unuan straton en 1888, aĝas 95 jarojn. En la
malnova Ĉinio ĝi estis nur grenfoirejo. Nun ĝi estas industria urbo kun
kelkcent mil loĝantoj. Estas menciinde, ke tie forpasis la fama internaci-
isma batalantino esperantistino Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren. En no-
vembro 1946, malgraŭ vintra frosto ili venis al la ĵus liberigita Jiamusi post
longa vojaĝo por komenci sian laboron. Operaciite, Verda Majo suferis de
infektiĝo kaj mortis en la deka de januaro 1947. Post nur cent tagojn
ankaŭ Liu Ren mortis de malsano.
La nove konstruita tombejo de Verda Majo kaj Liu Ren sur la monto
Sifeng ĉirkaŭita de akvo en tri flankoj ...”

VIRINO: Tiu infektiĝo okazis post abortigo, tion la ĵurnalisto ne diras.

RADIO-VOĈO: “Karaj aŭskultantoj, ni interrompas nian muzikan programon por sciigi pri
la vetersituacio. Pro granda neĝostormo estas malhelpata ŝosetrafiko en la
Centra Regiono, kie pluraj trajnoj restis neĝblokitaj. La meteologia centro
informas, ke simile forte vento blovis laste en 1947. Nia raportisto . . .

VIRINO:

(elŝaltante la radion, residiĝas al sia gazeto):

Ekde 1947 ne blovis tiom forta vento tie ĉi. Kiel aspektis Jiamusi en 1947?

Ŝi plue voĉlegas:

“Ne ŝirmu la orelon, ne kovru la okulon,
eĉ se vi timas morte.”

“Vidu, kara patrin’ mia

Ili estas nur du el la sennombraj,

Kiuj falis antaŭtempe,

Por ke maturruĝaj pomoj

eterne-bele

En la kontinent’, en Japani’

Kaj en la vasta tuta mondo.

Ruĝaj pomoj estas ŝiaj vangoj perditaj en Ĉinio. Indus fari teatraĵon el tiu sorto. Eble mi eraras. Eble ĝi sonus nekonvinke. Pasintece. La tekstojn de Verda Majo necesus imagi en la buŝo de iu riĉesprima aktorino. Ŝi havu agrablan voĉon, atentokaptajn okulojn. Kredon. Eble Gabi Jobba. Jen la solvo. Gabi Jobba havas la voĉon por la pensoj de Verda Majo. Eble ankaŭ staturon. Kaj energion.

(Ŝi maŝintajpas kaj voĉlegas)

“Estimata sinjorino,

Mi vidis vin lastjare en la rolo de Rita en “Aŭroroj tie estas silentaj” en Budapeŝto. Ĝi forte impresis min kaj mi kuraĝas direkti al vi la jenan demandon: ĉu vi ŝatus ankoraŭ foje prezenti iun teatraĵon en Esperanto. Mi nun esploras pri la vivo de japana esperantistino Hasegawa Teru nomata Verda Majo. Pri ŝi mi ŝatus kunmeti teatraĵon, kiu konsistu el ŝiaj tekstoj. Permesu nur mallonge prezenti ŝin: kiel japana esperantistino ŝi edziniĝis al ĉina esperantisto, forlasis Japanion kaj kaŝe fuĝis al Ĉinio — la lando kiu baldaŭ estos atakata de japana armeo. En tiu ŝia vivelekto ne temis nur pri ŝia persona amo al unu ĉino, sed ankaŭ pri ŝia politika decido. Post multaj humiliĝoj kaj mizero ŝi rajtis partopreni en la batalo kontraŭ la japanaj agresintoj kune kun sia edzo. Ŝi batalis voĉe disaŭdigante la elsendojn en la japana por la japana armeo, kaj plume, verkinte, ĉefe en Esperanto. Unu el ŝiaj verkoj portas la titolon “Flustr’ el uragano”. Post dek jaroj da flustrado en uragano ŝi mortis postaborte en neĝkovrita ĉina nordo. Postrestis du infanoj. Ŝia edzo ne postvivis ŝin je pli ol cent tagoj. Jen pli malpli la faktoj pri Verda Majo. La sentojn vi trovos en ŝiaj tekstoj. Multan dankon pro la konsidero de ŝiaj mesaĝoj.

(Serĉado de koverto. Pakado de la libro. Estingo de la lampo. Ŝi elscenejiĝas.)

(Gabi Jobba eniras kaj iom ordigas la trovitan scenararon; ŝi relumigas la lampon, sidas, ekstaras tuj parolante al la publiko)

GABI: “Kiu tempo pli efemerus
 ol printempo finiĝinta?
 Kiu bedaŭro pli eternus
 ol disiĝ’ amika?
 Estas la mezo de aprilo, 1937.

(Parolante al la lumigisto en la mallumo de la spektejo)

Kara, bonvolu ankoraŭ foje ĝustigi tiun ĉi.

(La nevidebla lumigisto direktas pli da lumo al ŝi. Ŝi tiras siajn manojn tra hararo, skuas ĝin, raspklarigas la voĉon, rekomencas)

“Kiu printempo pli efemerus
 ol printempo finiĝinta?
 Kiu bedaŭro pli eternus
 ol disiĝ’ amika?
 Estas la mezo de aprilo, 1937.

(Sin turnante al la spektejo)

Bruno, ĉu vi venis? Tre bone. Do, mi prezentos al vi nur la unuan parton el ŝia verko kaj vi bonvolu cerbumi kiel reĝisoro ĝin. Mi estus feliĉa se vi ne interrompus min ĝis la fino de la elektita parto. Cetere, mi petis vian helpon, nur ĉar mi scias ke vi kapablas ankaŭ silenti.

(Ŝi iras al la tablo, prenas la libron kaj eklegas)

Silente mi sidas sur la lito en la triaklasa kajuto de l’ granda brita ŝipo. Ĉirkaŭ mi troviĝas dek kaj kelkaj pasaĝeroj, viraj, virinaj kaj infanaj. Ili ĉiuj estas ĉinoj. Ĉinoj – hieraŭ ili estis por mi nur fremduloj, hodiaŭ kunvojaĝantoj, kaj morgaŭ ili jam estos samregnanoj. Multaj japanoj kutimas malrespekti ĉinojn. Ili rigardas ilin kiel malaltgradajn homojn. Per instinkta korpa malŝato ili malŝatas ilin. Kion ili scias pri ĉinoj? Jes, ili scias, ke ĉinoj malamegas japanojn kaj ĉie kontraŭas ilin, kaj ofte oni verŝas sangon pro

tio. Do, estas nature, ke miaj gepatroj kaj parencoj kolerās kaj miras pri mi, kiu volonte, – laŭ ilia esprimo – ofendas sin kaj la familion per la geedziĝo kun ĉino. Samtempe pri mia veturo al Ŝanhajo ili timas, kvazaŭ mi sen armilo min ĵetus inter malamikojn sangavidajn.

(Senvorte ŝi promenas tien-reen)

Mia intima amikino diris: ŝi scias ke multe da ĉinaj junuloj estas tute aliaj ol nunaj japanaj junuloj kies plimulto havas nenian studemon, nenian esperon aŭ pasion kaj nur vegetas kiel maljunuloj, do, ŝi komprenas mian amon. Sed, ŝi aldonis – se ŝi estus mi, ŝi prefere rezignus tiun amon, ĉar ĝi povus dronigi la patrinon ununuran en fundo de soleca malĝojo.

Antaŭ tago de l' forveturo mi ricevis ŝian mallongan leteron. Ŝi skribis: “Mi ne iris por vidi vin. Nur sur papero mi kuraĝas diri adiaŭ. Adiaŭ, kara. Estu feliĉa, kaj ne forgesu min. Kiam vi estus venkita aŭ via koro estus vundita, vi revenu al mi, mi ĉiam preparos por vi ripozejon.”

(Residiĝante)

Por ni esperantistoj nacianeco estas ne absoluta. Ĝi signifas sole malsamon de lingvo, kutimo, kulturo, haŭtkoloro. Ni rigardas nin kiel fratojn de unu granda familio “homaro”. Ni tion ne teorias, sed sentas. Ekstere ni estas ligitaj de unu sama lingvo, kaj interne de unu sama sento.

La japanaj regantoj faris fosaĵon inter japanoj kaj ĉinoj. Ili ĉiam pli profundigas kaj larĝigas ĝin, kaj ŝajnigas ke ĝi estas natura kaj netransirebla.

Ĝis nun eble kelkcent aŭ kelkmil japanaj virinoj transiris tiun fosaĵon kaj edziniĝis al ĉinoj. Mi ne scias ĉu ilia vojo estas flora aŭ dorna. Ilia amo estis internacia sed samtempe persona. Ankaŭ mi estas unu el ili. Neidentas, ke nia kuniĝo estas neapartigebla de Esperanto. Sekve, feliĉo aŭ malfeliĉo de mia estonto estos alia ol tiu de tiuj japaninoj. En Ŝanhajo li atendas min. Krom li mi havas neniun konaton. Tio tamen donas al mi nenian heziton. Mi diris, ke mi havas neniun krom li. Ne, mi eraras. Tie mi trovos verdajn amikojn, ĉinajn esperantistojn, kvankam nun mi ne scias eĉ ilian nomon.

(Ŝi paŭzas)

La duan tagon vespere nia ŝipo haltis ekster la bordo de Nagasaki, la lasta japana haveno dum la veturo. Halto de unu horo. Kiel longa kaj maltrankvila estis por mi tiu ĉi unu horo! Mi ekĝemis pro malŝarĝiĝo kiam oni sci-

igis la ekiron.

Nun antaŭ mi kuŝas nur la libera maro. Ĝi apartigas min de la patrio, de miaj karaj, ĝi tamen kondukas min al la nova vivo, al novaj amikoj. Adiaŭ. Trankvila estas la dormo de la nokto. En la sonĝo mi vidis kviete defaltajn ĉerizflorojn.

(Al la reĝisoro en la spektejo, nekontente.)

Ho, Bruno, tio ne funkcios. Diru nenion, mi scias: estas tro da tendenca teksto. Oni ne povas fari elekton, se oni tro estimas iun aŭtoron. Mi povas nenion elĵeti el tiu unua ĉapitro. Mi forigis nur ŝian sintenon al Hitler el tiu ĉapitro. Kion mi povus prisilenti ankoraŭ: oni renkontas ŝin jam surŝipe, ŝi jam estas la edzino de ĉino. Mi devas reteni ŝian opinion pri rilatoj inter ĉinoj kaj japanoj, pri amikino kaj ŝi, esperantistoj kaj nacieco. "Nia kuniĝo estas neapartigebla de Esperanto". Jen la esenco. Kaj ĉerizfloroj aldone. Ĉu pri ili mi rezignu? Nun mi havas problemon: en Ŝanhajo ŝi renkontos ŝian edzon. Ili ne vidis sin kelkajn monatojn, li alvojaĝis pli frue, post la geedziĝo en Japanio. El tiu renkonto en Ŝanhajo mi havas nur kelkajn liniojn, skribitajn ses jarojn poste:

"En mia koro ankoraŭ freŝa estas la memoro kiam mi sekure staris sur la kajo de Ŝanhajo kaj trovis lin alvokantan min per mansigno. Por nure nomi ĝin "ĝojo" la sento estas tro komplika. Silente mi prenis la manon. Mi ne havis vortojn por esprimi min. Ial, ŝajnis al mi, ke lia mano estas pli granda kaj pli varma ol antaŭe.

Tagmeze, en la 19-a de aprilo 1937, mi tiel faris la unuan paŝon sur la granda tero de Ĉinio. En Ŝanhajo ni loĝis duonjaron, ĝis la milito pelis nin norden. Do. Ŝanhajo devas esti por mi plej impres- kaj memorplena, sed, verdire . . ."

Bruno, pardonu, mi nepre ŝatus iel reliefigi la frazon "Lia mano estis pli granda kaj pli varma ol antaŭe". En ĝi komenciĝas ilia harmonio. En tiu momento tiu viro havis jam la okazon seniluziigi ŝin. Sed ne tiel okazis. Mi ŝatus prezenti tiun virinon kiel la virinon kiun ŝia edzo ne seniluziigis. Ne perfidis. Nu, necesus tiun penson involvi en ĉerizpetaloj.

(Ŝi lekas lipojn.) Mi povus iom da akvo nun, antaŭ ol daŭrigi.

(El la publiko venas al ŝi glaso da akvo. Ŝi ridete dankas, trinkas enpenŝiĝema kaj metas ĝin surtablen.)

Politikaj cirkonstancoj ne interesas min tiom, kiom ŝi mem en ili.

(Ŝi el la valizo elprenas kelkajn objektojn dismetante ilin surtablen, ŝanĝas sian bluzon, kombas sin.)

Nia ĉambro unufenestra estis malluma kaj senmebla. La muro, iam bele blanka, nun staris flav-griza makulite. Sole kun du kofroj, valizo, skribmaŝino kaj malgranda lito, la ĉambro ŝajnis vasta, kruda kaj malintima. “Sinjorino naskiĝis en Malajo kaj revenis al Ĉinio je la unua fojo. Ŝia familio ankoraŭ estas tie. Ŝi nur povoscias malajan lingvon.” (Tio estis Esperanto). Tiel decidis Liu kaj la geamikoj. Feliĉe tamen por homo kiel mi, la franca koncesia kvartalo en Ŝanhajo, kie ni luis ĉambron, ne estas Tokio. Tie ĉi neniuj scivolemas pri deveno kaj kariero de persono. Nek la dommastrino nek najbaroj nek policianoj.

(Amikintone.)

Mi devis komenci ĉion de ABC. La amikino estis mia instruistino. Ĉiumatene ŝi eliris straten por aĉeti manĝaĵojn kaj kuiris hejme. Mi, lernoservanto, lavis ilojn post manĝo. Mi baldaŭ ellernis fari fajron – en moderna Ŝanhajo plimulto da ĉinaj loĝantoj eĉ gason ne havis – kaj poste mi lernis kuiri. La afero estis tre simpla, ĉar ni manĝis nur dufoje, tage kaj vespere, por ŝpari monon.

Kompreneble, ni prenis “ĉinan kuiradon”, sed ne tiun kiu estas fama en la tuta mondo, sed tiun el malkaraj legomoj frititaj en faboleo, kaj gustigitaj per salo, iufoje kun pecetoj da viando. Oni ŝerce nomis Liun “la plej feliĉa viro en la mondo”, ĉar li loĝas en eŭropstila domo, manĝas ĉinan kuiradon kaj havas japanan edzinon. Ho, kiel pseŭdaj estas liaj tri trezoroj! Tiu kompatinda feliĉulo laboris en nove fondita eldonejo por broŝuroj pri aktualaj problemoj. Mia unua kaj plej grava tasko estis kiel eble plej rapide kutimiĝi al cirkonstancoj kaj ellerni la lingvon, t.e. ĉiniĝi. Se ne, ni devus eterne kaŝi en Ŝanhajo, en la malgranda franca koncesia kvartalo. Supozu, ke vi subite fariĝis muta kaj surda. Ĉirkaŭe la homoj vivas vigle kiel antaŭe, sed vi estas soleca inter ili. Vi ne komprenas ilin, kaj ili ne vin . . .

Mi estis preta por tiu portempa fremdula sufero, mi kredas, sed sento ne ĉiam obeas racion. Precipe, kiam ni estis kun amikoj, mi sentis tion forte, profunde. Ili parolas gaje, ridas, ekscitiĝas. Mi streĉas miajn nervojn, penas kapti kurantajn vortojn. Fine mi laciĝas, ne volas aŭskulti plu. Mi klinas la kapon, rigardas premate la plankon. Al mi ŝajnas, ke eĉ li, kiu kune kun ili ridas kaj ekscitiĝas de io pri mi nekomprenebla, estas ne mia, sed iu fremda, malproksima . . .

(Gaje)

Estis mezo de la dua monato, dum tagmanĝo la geamikoj kaj Liu interkonsiliĝis. “Longiĝis tago. Manĝi dufoje estas nesufiĉe”. “Jes, antaŭtagmeze mi sentas teruran malsaton”. “Do, ni ankaŭ manĝu matene”. “Pano estas bona”. “Ne, ĝi estas kara. Ni kuiru rizkaĉon”. “Mi komprenis!” – mi ekkriis kiel infano kaj ripetas ilian parolon. “Prave!” ankaŭ ili kriis ridantaj. Pro malbono de nia financa stato, nek pano nek kaĉo estis realigita, tamen, mi estis tre ĝoja, ĉar ja por la unua fojo mi komprenis tutajn frazojn de ilia konversacio. Vorton post vorto.

(Konfidence)

Mia unua enspezo en Ĉinio: per poŝtmandato venis 50 enoj el Japanio. Pago por la unua artikolo el Ĉinio. Mi publikigis ĝin en “Nihon-Hyooron” sub ĉina pseŭdonimo. La monon Liu ricevis ĉe Japana Banko la 12-an de aŭgusto kaj la sekvintan tagon la japana armeo ekkanonis la urbon. Ha, se ni malfruus unu tagon!

(Triste)

La unuaj monatoj pasis malrapide. Ĝi estis vivo nova por mi, sed proza kaj ofte eĉ enua. Fremdaj vojaĝantoj amas vagi sur strato kiel naĝanta ŝipeto sur maro, renkontante neniun konaton. Al mi mankas eĉ tiu libera plezuro. Mi, malriĉulo, apartigita de la moderna vivo, estis ankaŭ disigita de la tero. Mi loĝis sur la dua etaĝo, mi nek havis ĝardenon, nek poton da floro. De la ligna planko de temp’ al tempo mi eliris sur la straton asfaltan por viziti amikojn aŭ por promeni, kaj denove envenis en la sengustan duonluman ĉambron de la dua etaĝo. Mi forgesis la agrablan senton de la mola freŝa herbo. Kaj se mi ne estus esperantistino kaj ne povus spiri la verdan aeron, mia vivo tiama estus pli seka kaj pli sufoka. Dank’al Esperanto mi ne estis tute fremda en Ŝanhajo nek indiferenta en la milito, kvankam tiam mi ne povis publike partopreni la ĉinan reziston kontraŭ la japanaj invadistoj.

(Melankolie)

Mia edzo multe forestis postkurante laboron kaj modestan enspezon. Sed li trovis tempon por mi. Pri reciproka kuraĝigo ni ne parolu. Sed li estis apud mi. Ankaŭ dum la kanonado de Ŝanhajo.

Trankvilis la fruaŭtuna tagmezo de la franca parko. Sen peceto da nubo bluis alte la ĉielo. Aromis krizantemaj floroj blanke kaj flave sur la verda razeno. Tie kaj ĉi tie promenas sinjoroj kun cigaredo en la buŝo, aŭ junaj geamantoj brak’ en brako. Inter tiuj ĉinoj ankaŭ videblas figuroj de 2-3 vietnamaj policanoj. Brunnigraj vizaĝoj kun densa barbo, blanka tuko ĉirkaŭ la kapo. Iradas ili dekstren-maldekstren enue, maŝine. Unu el ili haltis antaŭ la kaĝo de simioj. Infaneca larĝa rideto kuras sur lia barba vizaĝo. Li alparolas ilin en la lingvo por ni nekomprenebla, amike-familie. Fine li deprenas el la poŝo sukeraĵojn ŝajne bonkvalitajn, deŝiras la belan

kovrpaperon, ĵetas unu en sian buŝon, kaj poste donas po unu al ĉiu el kelkaj simioj.

Bang-bang — subite ektondras kanono tre surprizinte la trankvilan aeron de la tagmezo.

Mi iris kune kun Liu, kiel la aliaj paroj de geamantoj, tra la aromaj krizantemoj blankaj kaj flavaj. Trakvilis la fruaŭtuna tagmezo en la franca parko.

(Paŭzo. Eta voĉŝanĝo pro deprimiĝo.)

Preskaŭ ĉiuj japanoj en Ŝanhajo jam hejmeniris, kaj morgaŭ, oni diras, forveturos la lasta ŝipo al Japanio. Plimulto de “japanoj-edzinoj” disiĝis de la edzoj kaj forveturis, pro provizora senĝeneco kaj sekuro. Patrio! Kiel ĉarme sonoras la vorto! Kaj oni prijuĝas, ke pli feliĉaj ili kiuj havas la patrimon por reveni, ol mi kiu nek povas reveni al ĝi nek eniri la edzlandon, kaj kiel malforta leporo ĉasata de du flankoj, vagadas sur “la neŭtrala zono”. Kien iri?

Unu amiko baldaŭ estis ironta al interna provinco. Ni enloĝiĝis en lian ĉambron. Post lia foriro ankoraŭ restis 10 tagoj de la monato por kiu li jam pagis. Dek tagoj. Kaj poste?

(Iom moke)

Ni eliris serĉi ĉambron. Serĉi ĉambron? Ke tio estas absolute neebla por ni evidente scias ni mem. Falas grizaj pluvetoj ekstere.

Sencele ni iras sur stratoj jen rekten, jen flanken, jen returnen. Sur ĉiuj stratoj svarmis rifuĝintoj. Ili estas rifuĝintoj en la vera senco de la vorto; la “altklasaj” jam de longe trovis por si komfortan neston. Nun ili ŝmacas je eŭropaj frandaĵoj, trinkas kafon, sidas en kinejo aŭ dancejo. Tiuj per aŭtoj kunportis objektojn necesajn kaj superfluajn, kiel ni vidis. Sed la aliaj nenion, krom kelkaj litaĵoj kaj vestoj, kaj iuj tute, absolute nenion. Por ili porti sin mem per du kruroj estis ja maksimume. Unu mezaĝa virino nudpieda kun gapa mieno paŝas nur portante malplenan saŭcobotelon. Certe ŝi mem ne konscias por kio ŝi savis ĝin el sub la malamika kanonfajro kaj kvazaŭ solan trezoron kunportas kun si.

— Bonfara sinjorino, estimata sinjorino — kelkfoje antaŭ min ŝoviĝas manoj, velkaj, kalaj kaj infanaj — kompatu min, mi jam tri tagojn nenion manĝis. — Mi amare ridetis en mi. Estas ne strange, ke ili rigardas min riĉa virino, ĉar mi portas tre novan veston. Kie mi havus eluzitan ĉinan kostumon? Kiel ili povus kompreni, ke ankaŭ ni ne manĝis de la mateno, kaj ne havas liton eĉ por la hodiaŭa nokto. Kia diferenco ekzistas inter ili kaj ni? Foje kaj foje ia timo trakuras min: se ili rimarkus mian devenon... Nun ja neniuj rajtas postuli de ili racion distingi amikon kaj malamikon el japanoj.

Mi iras nervostreĉe, laŭeble imitante la sintenadon de ĉinaj urbaninoj.

(Triste)

Pluventas. Pluventas grize.

Estas malvarme, kvankam mezas aŭgusto. Pli froste estus en koro ilia kaj nia. Ni vagas kune kun ili straton post strato. Sencele, senespere, lacege. En mi tamen ne estingiĝas la flamo ruĝa.

Posttagmeze malfrue ni trenis nin fine al la oficejo de Ŝanhaja Esperanto-Ligo. Milde kaj kompate rigardas nin Zamenhof tra la okulvitroj. Savanto nia aperis el liaj vivantaj disĉiploj. Li estas kamarado Venk, nacilingva poeto, kiun ni vidis nun je la unua fojo. Li diras, ke li havas du ĉambrojn kaj en unu el ili li allasos nin tuj. Tuj.

(Senespere)

Ĝis kiam ni devos kaduki sen pano kaj libero tie ĉi? Forkuro jam de longe staras kiel neevitebla problemo antaŭ ni. Tamen kien kaj kiel? Por ni ĉiu vojo estas tro mallarĝa, kaj ĉi tie la danĝero kun ĉiu tago urĝiĝas. Post interkonsiliĝo kun geamikoj, ni fine decidas forkuri suden. Ni deziras, aŭ pli ĝuste, ni revas iri al Hankou, la nova centro de rezistmilito, trapasante Hongkong kaj Kantonon. Ah, se ni nur povus atingi tien. Ne gravas, eĉ se oni arestus min en la momento de elvagoniĝo. Sed... ĉu estus eble, ke nenio okazu survoje? Geamikoj helpis al ni. Ĵelezo akompanis nin al la ŝipo. Kiel ni, jam elĉerpintaj la lastan moneron antaŭ semajno, povus veturi sen li? Malmultvorte li faras ĉion por ni. Kaj eĉ dankon mi ne diras al li. Ĉu homoj havas vortojn por esprimi sin en tia kazo?

En la kajo kaj ŝipo estas superfluo de homoj kaj pakajoj ĉiuspecaj. Ni estas kondukitaj al negranda kajuto, duonhela kaj sufoka nur kun unu fenestro kaj lampeto. Mi eksidas sur mia loko. Eĉ side la kapo preskaŭ tuŝas la supron kie kuŝas nekonato.

(Konsole-dolore)

Apud mi kuŝas Liu, kiu altkreska, ne povas plene etendi sin. Kiom da suferoj li devas porti por mi! Tion li jam antaŭvidis en Tokio, li diras ofte, tio estas nenio por li. Sed, kiam lia sufero kaj sindono finiĝos? Ĉu ili ne velkos senfruktaj?

Plaŭdadon de la ondoj mi aŭdas etete sed ne orele. Se mi ne estus...

Mi rapide forbalaas la sensencan imagon. Disbato de la vojo kaj seninterrompa konstruado. Ĉu estas alio por nia komuna vivo? Precipe nun, kiam la ekstera nevidebla forto estas tiel superrega.

Mi sentas heliĝon de la koro. En la mallumo antaŭ la fermitaj okuloj mi prezentas nian estonton. Tamen nur nebule...

Nia lito tuj frontas la eksteron nur pere de l' muro, kaj mi sentas ke la ondoj pli kaj pli altiĝas. Mi eksidas, esperante, ke tio donu al mi ioman komforton. Vane. Ree mi kuŝigas, turnas min. Nenio helpas. La ŝipo jen suriras mondon de ondo, kaj la sekvan momenton abrupte falas en la fundon de la valo. Tio ne estas simpla supren-malsupren iro. Ĝin partoprenas ankaŭ skuo dekstren-maldekstren. Ĉe ĉiu balanco-skua mia korpo ruliĝas, la korpo kunpremiĝas. Ĉiuj nervoj en la cerbo estas kvazaŭ krevontaj. Sensignifaj pensoj aperas-malaperas senorde. Fragmentoj de nekomprenebla ĉina lingvo parolata de la samĉambranoj malagrade preterpasas miajn orelojn. Nenion mi volas. Absolute nenion. Dormi, nur dormi, se eblas. Antaŭ la fermitaj okuloj sennombraj etaj kvazaŭpunktoj de nigrobluakoloro akvokirle turniĝas, forfluas, turniĝas, forfluas. La junuloj en la ĉambro senĉese manĝas, kantas, babilas, ridas. Ankaŭ Liu bone parolas kun ili. Mi ne komprenas kial ili povas sinteni tiel gaje kaj senĝene sur tiu ĉi hamako. Al mi ŝajnas ke ili estas homoj el alia planedo. La studentoj aŭdigas diskojn. Metaleca kantado el ĉinaj klasikaj dramoj akre tranĉas miajn orelojn. En la kele mallumeta ĉambro estas sufoke kaj vomige de tabakfumo. Jam furioziĝanta ondado senĉese skuas-balancas mian tutan korpon. Neelteneble doloras la kapo, kvazaŭ ĉiuj faldoj kaj fibroj de l' cerbo krevonte baraktas unuj kontraŭ aliaj. Mi kuŝas alvizaĝe al la nigra muro, firme fermas la okulojn kaj kovras la kapon per la litaĵo. Sinsekvoj de strangaj sonoj jen malalte jen alte knaras kaj klakas, kune kun vortoj por mi nekompreneblaj. Ĉiuj, inkluzive Liu, ĝue aŭskultas, de temp' al tempo laŭdante kaj kritikante. Mi sentas min sola. Nur mi estas ekster ili. La metaleca voĉo, kiu ŝajnas ne el laringo sed kvazaŭ el la pinto de kapo, min pikas kaj ŝiras. La ondoj pli kaj pli sin montras malicaj. Ne pensu pri ondoj, diris Liu. Doloras, doloregas la kapo. Pretervole ekfluas larmoj el la okuloj. Fora fariĝas eĉ Liu. Kiel dorlotita knabino dum malsano nerveze plendas mi pri la distanco inter mi kaj la fortika amato... Liu riproĉas mian etburgan arbitron, admonas ke mi ne izolu min de la aliaj, kaj fine juĝas, ke mi ne estas fidela al li.

(Longa silento.) La ŝipo haltis en Shantaŭ. Ĉi tie mono ja havas 3-5 oblan aĉetkapablon ol en Ŝanhajo. Liu aĉetas oranĝojn por mi. Dum la lasta printempo mi pro malvarmuma febzo forte deziris frukton kiu estis centprocenta luksaĵo por ni. Liu aĉetis kelkajn oranĝojn por mi. Unu kostis po 15 cendoj. Kaj ĉi tie nur po unu cendo. Ni aĉetas multe, gustumas superkontente. Tra la korbo ili ore alridetas min, kaj ni sentas infanan helan ĝojon.

(Gajete) Strange, kiom varmkore mi memoras pri tiuj oranĝoj post la mizera vojaĝo. Do, ni venis fine en Kantonon.

(Amare, reĝustigante okulvitrojn)

Apenaŭ ni eksidis sur rikiŝojn por iri hotelon, el la homamaso antaŭ la haveno elpaŝis viro malalta kun malagraba mieno. Ho, ĉielo! Momenton ekhaltis en mi la korbato. Ĉu ŝi estas via edzino? Jes. Oni diras ke ŝi estas japanino. Ne, ŝi ne estas japanino. Sed ŝiaj gepatroj estas elmigrintoj, tial ŝi ne povas libere paroli en la ĉina lingvo.

Post kelkaj minutoj ni sidas en komforta ĉambreto de unuaranga hotelo Nova Oriento. Alta plafono, granda lito pure kovrita, porcelana planko kun geometriaj desegnoj. Laŭ nia malpeza poŝo ni devus esti en gastejo. Sed tiaokaze oni certe bezonas ŝajnigi sin ne malriĉaj.

Inter la detektivo kaj Liu denove komenciĝas demandoj. Maltrankvile kaj malpacience mi aŭskultas ilin, rigardas ilin, kiuj decidis mian sorton. La koncernato estas ja mi mem, sed la detektivo neniam turnas sin al mi. Li ankoraŭ suspektas min ke mi estas japano. Liu persistas ke mi estas ĉino, tamen ankaŭ li ne povas montri pruvon. La rolo de Liu ne estas facila, ĉar veroj povas glite flui el la buŝo, sed mensogoj nur zigzage.

La detektivo foriras kaj revenas kun sia superulo. Plia duonhoro da timo. Tiam ili ekstaras, ĝentile salutis por adiaŭi. Sed laste ili ankoraŭ aldonis, ke se mi estus japano, li devus tuj disigi de mi laŭ la milita dekreto. Kaj ke mi ne iru eksteren ĉar oni povus erare disbati min.

— Pardonu, kara, kulpa estas mi, sed oni nur vin...

— Ne. Por vi mi sentas nenion sufera.

(Ame) Malordeta estas lia hararo pro l' marveturo, lace li aspektas. Tamen li ne sidiĝas kaj paŝadas tien reen en la ĉambro.

Post ŝika vespermanĝo kaj agraba bano, mi staras ĉe l' fenestro, rigardas malsupren la straton prilumatan. Pala malpleneco kaj nigra ŝtopiteco alternas en mi ĉiuminute.

Kio morgaŭ okazos al ni? Sen monò, sen garantio...

... Ej, morgaŭ estas morgaŭ, kaj hodiaŭ ni tamen vivas. Nur la lito, pura kaj komforta nun allogas nin, kiujn ĉifis ne sole la semajna sinĝena vojaĝo. Al dorm' al profunda dormo. Morgaŭ estas morgaŭ!

(Ŝi venas al la spektejo)

Bruno, ĉu vi sekvas min? Pensu kion mi faru pri tiu damnita vojaĝo kiun

mi volis reteni. Pro tiu kulturdiferenco interalie. Ŝia sufero kreskis pro la metaleca voĉo de la strangsonaj diskoj, ne nur pro la ondoj. Kaj ŝia edzo estis fremdulo al ŝi dum tiu vojaĝo. Li ne suferas de marmalsano, li aŭskultas muzikon, li konkludas ke ŝi ne estas fidela. Kion signifas tiu vorto “fidela” en ĉina-japana penso? Kiu scias. La oranĝojn mi ŝatus reteni. Mi mem sentas kiel ili bongustas post tiu humiliga vojaĝo. Ĉu la detektiva sceno ŝajnas esti tro pala? Ĉu ŝia timo tro malforta? Tiun luksan ejon de la eleganta hotelo mi volas reteni. Porcelana planko kun geometriaj desegnoj. Mi volis ripozigi ŝin unu nokton almenaŭ en iu komforta lito. Lasi ŝin milde odori post la bano. Espereble li ĉirkaŭbrakis ŝin dum ŝi dormis tiunokte.

(Ŝi silente revenas al la scenejo)
(Ofictone)

Forpelo! Unu simpla vorto. Forpelo. Ĝi ne estas mia iluzio sed fakto. Kaj oni aldonas al ĝi ankoraŭ vorton “senprokraste”.

Posttagmeze de l’ sekva tago mi jam estis en vagonaro al Hongkong. Amiko Dinko min kunprenas. Lia patrino havas ĉambrojn en Honkong kiel aliaj riĉaj kantonanoj ĉar tiun ĉi “neŭtralan” urbon ne minacas malamika bombardado. Provizore mi estos tie kaj atendos Liun kiu venos post unu-du tagoj. Li devas ordigi ĉion. Li estas ĉino, do oni ne forpelis lin el la lando. Li povas resti en Kantono, se li volas, diris la detektivoj. Tamen, kiel li povus lasi min sola?

La vagonaro kuras, kuradas. Komencis krepuskiĝi. Dinko silentis, kvankam li ne mienis severe. Ĉe ĉiu stacidomo li aĉetas malgrandajn manĝaĵojn, metas ilin antaŭ mi. Inter ili troviĝas nigraj insektoj, ŝajne rostitaj, kiuj en aliaj lokoj nur ĝojigas infanojn kiel ludiloj. Nur por danki lian bonkoron, mi prenas kelkajn fruktojn kaj sukeraĵojn. Apetiton mi ne havas. Ne la insektoj forrabis ĝin. Kiom da stacioj estas ankoraŭ antaŭ ni? Mi tute ne scias, ĉar tiufoje per ŝipo ni venis de Honkong al Kantono. Mi ne demandas. Ĉar kiam ni atingos, mi perfekte indiferentas. Tie min atendas nur nulo, nigra absoluta nulo.

Kiam mi endormiĝis? Mi vekigis de parolvoĉoj. Apud mi staris du viroj en eŭropaj vestoj, post ili ĝendarmo. Mi ne komprenas ilian lingvon, sed mi povas supozi kion ili diras. Venis, finfine tio kio devis veni kaj jam minacis ne unufoje. Sed ĉi-momente mi ne sentas timon. Dinko aspektas pale.

— Ili diras ke ni reiru al Kantono.

Milda estas lia tono. Certe li pensas ne maltrankviligi min. Mi kapobalancas al li kun nevortigita esprimo de danko kaj pardonpeto.

(Malgaje)

Ni elvagoniĝis ĉe la sekva malgranda stacio. Ĝi havas solan lampeton. Sur la kajo jam staras kvar ĝendarmoj. La prilumita vagonaro veturas for. Ni restas en la duonlumo, atendante tiun kiu nin portos tien de kie ni venis. La vespero de la februaro estas malvarma, kaj glacie brilas la ĝendarmaj bajonetoj antaŭ ni.

(Paŭzo) (*Ŝi per manplatoj kovras la vizagon, retenas ilin sure kaj malrapide forigas ilin*)

Bruno, je tiu punkto ĉesas ŝia teksto en “En Ĉinio Batalanta”. Tiel ŝi titolis sian unuan libron. Pri ŝia vivo de forpelito en Honkong ekzistas neniumaj notoj. Al Japanio ŝi neniam reiris. Poste efektiviĝis io el ŝiaj deziroj. Efektiviĝis? Kiu scias! Kio efektiviĝas el niaj voloj?

“Mi kredas kaj sentas ke en Ĉinio mi povas fari iom pli multe aŭ ion pli signifan ol se mi restus en Japanio.” Esperantistoj helpis al ŝi trovi laboron en Wuhan kaj poste en Chonqing. Ŝi enposteniĝis kiel parolistino de japanlingvaj elsendoj ĉe la Kuomintanga Centra Radiostacio. La elsendoj estis dediĉitaj al la oreloj de japanaj soldatoj. Kiel radioparolistino ŝi jam havis etan sperton el Japanio. Kiam ŝi estis forpelita el la lernejo en Nara ŝi sukcesis en la unua ekzameno por la ofico de parolistino en Japana Radiostacio. Postrestis pluraj dokumentoj pri la reeĥoj de ŝiaj japanaj elsendoj el Ĉinio. Ankaŭ unu poemeto de iu soldato de la invada japana armeo:

“Parolas Radio Chongqing

Mi kaŝe penis aŭdi

La fluon de l’ japanlingv’.

Ho mia kor’ ne ĉesis ekzalti.”

Kiam la urbo Wuhan falis en japanaj manoj, la japana tagĵurnalo Miyako Sinbun en Tokio raportis pri ŝi la unuan de novembro 1938. La ĵurnalisto de la artikolo nomis ŝin “dolĉvoĉa naciperfidulino”. Ŝia patro post tiu artikolo ricevis ĉantaĝan leteron, kun la postulo, ke “li atribuu al si mem la kulpon kaj faru suicidon”. Ŝi aŭdis pri tiu artikolo. Pri la letero al ŝia patro eble ŝi ne sciis.

Certe multe da ekscito alportis al ŝi la renkontiĝo kun Zhou Enlai. Li alparolis ŝin dum iu solenaĵo la 27an de julio 1941. Li aludis al ŝia bildo en Japanio: “dolĉvoĉa naciperfidulino”. Kuraĝige li nomis ŝin “vera patrioto, fidela filino de la japana popolo”.

El tiu tempo okazis ankoraŭ io tre grava: ŝi patriniĝis. Pri tiu tempo postrestis neniam notoj. Tamen, mi trovis iun fragmenton pri patrineco verkitan en Japanio ankoraŭ. En 1933 ŝi skribis: “Mi supozas, se mi etburĝe edziniĝos, la klaskonscio turmentos min de temp’ al tempo; sed kiam mi patriniĝos, mi povos forgesi ĉion...”

Ŝi absolute ne etburĝe edziniĝis. Kaj ŝi ne forgesis. Kiam finiĝis la Rezistomilito, laŭ instrukcioj de Zhou Enlai, la geedzoj veturis kun aliaj kamaradoj en Nordorienton. Ili laboris kiel redaktoroj en Harbin. Poste ili translokiĝis al Jiamusi.

Jiamusi estis la mortloko por ili ambaŭ. La kaŭzo de ŝia morto ne estis ftizo pri kiu ŝi suferis ankoraŭ en Chonqing. La kaŭzo de la morto estis tre virina: infekto post aborto. Ĉu ŝi volis havi ankoraŭ unu infanon?

Tri monatoj post ŝia morto forpasis ŝia edzo. Pro malsano. Detaloj nekona-taj. La orfoj, filo Liu King kaj filino Liu Kielan ricevos poste zorgadon kiel posteuloj de martiroj.

De ŝi postrestis du infanoj kaj tri libroj el milittempa Chongqing.

Pri la infanoj mi ne multon scias. Pri la libroj iom pli. La papero uzita estis de tre kruda speco, produktita en Siciuan provinco per malnova metodo. Ŝi estis 35-jara kiam ŝi mortis. Ŝi estis kiel mi.

(Melankolie ŝi ridetas, kaptante la manikon por vidi la brakhorloĝon.)

Kiom longe tio daŭris, Bruno? Vi estas vere pacienca ulo. Nun estas via vico por komenti. Bonvolu estingi la reflektoron, mi venos al vi. Mi scivolas kion vi diros. Ankaŭ pri la titolo mi volus konsulti vin. Mi ŝatis ŝian titolon "Flustro el uragano".

(Ŝi prenas de la tablo paperojn kaj forlasas la scenejon. La reflektoro estingiĝas, restas nur eta lampo surtable. Alveninte jam proksime de la spektejo, subite ŝi revenas en lamplumon scenejmezen, serĉante ion.)

Kion? Kion mi laste faris? Kial? Mi ludis en "Romeo kaj Julieta". Ne la ĉefrolon. Por mi la vivo elreĝisoris flankrolojn.

(Ŝi ordigas la tablon, fermas la tajpilon, prenas la libron. Descendante, lace, sen gajo.)

Mi pretas.

(Mallumo. Paŭzo. Relumiĝo. Ripeto de la unua sceno kun la sama muziko.)

VIRINO: Hasegawa Teru, japana esperantistino, plumnome Verda Majo, mortis en januaro 1947 en Ĉinio.

En tiu jaro naskiĝis en Hungario aktorino Gabi Jobba. Ŝi rolis en Esperanto en du teatraĵoj. Pri Verda Majo ŝi nenion sciis. La proponon surscenigi ŝian flustradon el uragano ŝi neniam ricevis.

La teksto de Verda Majo kaj la voĉo de Gabi Jobba renkontiĝis nur en la imago de skribtablo.

Gabi Jobba mortis en Budapeŝto kelkajn tagojn post la Budapeŝta Kongreso, en aŭgusto 1983. Si mem decidis pri sia morto.

La monologoj pri Verda Majo estis skribitaj por ŝia morta voĉo.

(Mallumiĝo.)

“Ne ŝirmu la orelon, ne kovru la okulon, eĉ se vi timas morte.”